

Heinrich Heine,  
La malĝojulo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉiuj sentas en la koro  
Veon pro la knabo ĉi;  
Ĉar videblas la doloro  
Ja sur la vizaĝ' de li.

Aerume malvarmigas  
Kompatemaj ventoj lin,  
Lin ridete refreŝigas  
Kelka rifuzema in'.

El sovaĝa urb-bruado  
Fuĝas li al la arbar',  
Kie sonas bird-kantado  
Kaj susuras la frondar'.

Sed la ĝoja kant' mutiĝas,  
Tristas arbo kaj foli',  
Kiam lante proksimiĝas  
La malĝoja ulo ĉi.

*Traduko de la Germana poemo "Der Traurige" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-01-22.*

*MR-116-1 / Arg-206-412 (2004-03-12 23:27:23)*